

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5 oktobro/novembro/decembro 1988



32. GEFA-Jahresversammlung 7. bis 9. 10. 1988 in Kaiserslautern



**En Schwarzenacker apud Homburg (Saar)
antaŭ la elfositaj fundamentoj de iama romia urbeto**

(Foto: Herlitzte)

Post la jarkunveno de GEFA

La sudokcidenta urbo Kaiserslautern gastigis de la 7a ĝis la 9a de oktobro 1988 proksimume 60 membrojn kaj amikojn de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) okaze de ilia 32a jarkunveno. Kun gastoj el Belgio, Francio, Pollando, Svislando kaj unuafoje ankaŭ de Sovetunio, la kunvenintoj ĝuis amikan etoson kaj allogan programon.

La centre situanta Kolping-domo servis kun siaj salonoj kaj dormoĉambroj kiel taŭga kongresejo. Ankaŭ agrabla restoracio estis je dispono. Tie oni kunvenis vendredon vespere por interkonatiĝi kaj saluti komunajn geamikojn. En la Kasimir-salonego de la iama imperiestra palatino la ĉefurbestro, iama fervojisto, bonvenigis la kongresanojn kaj regaligis ilin per regiona vino. Estis plezuro aŭskulti liajn spritajn klarigojn kaj favoran prijuĝon de Esperanto.

La ofertitan rondiradon tra la urbocentro eluzis la plej multaj, kvankam la vetero ne estis tro bona. Preĝejoj el la mezepoko estas vizititaj kaj aliaj vidindaĵoj, kiuj travivis multnombrajn detruojn dum la pasintaj jarcentoj. Hodiaŭ Kaiserslautern situanta proksime al la franca landlimo estas moderna urbo, kiu sin gloras posedi la plej altan urbodomon de nia lando.

Por la oficialuloj la tagordo de la labor-kunsido antaŭvidis multajn temojn, kiujn GEFA-prezidanto Giesner pritraktis kun la estraranoj kaj komisiitoj por Esperanto ĉe la fervojaj direktoj. Ekzemple oni priparolis la pasintajn kaj estontajn aranĝojn de GEFA, IFEF kaj UEA, la rezultojn de la telekurso, la finitajn traduklaborojn de la UIC-fakterminaro kaj la komencitan kunlaboron kun la Terminara Centro de UEA. Granda zorgo estas la manko de junuloj en GEFA pro la regresanta dungado de fervojistoj, sed kaŭzita ankaŭ de la ĝenerala malintereso pri Esperanto.

La aŭtobusekskurso, sabaton posttagmeze, kondukis al la elfosaĵoj de iama romia urbeto proksima al Homburg (Saar), kiuj nur antaŭ du jardekoj estas eltrovitaj sub kampara tereno. Kelkajn domojn oni rekonstruis sur originaj keloj, tiel ke la vizitantoj povas facile imagi al si, kiel tiam la ĉiutaga vivo disvolviĝis en mezgranda urbo kun longaj arkadoj, putoj, kanaloj, subplankaj hejtajfoj, sed sen remparoj kaj kasernoj. Invadantaj ĝermanaj triboj detruis preskaŭ ĉion. En iama muelilo, nun grandampla restaŭracio, la ekskursantoj faris kafopaŭzon, antaŭ ol la aŭtobuso transportis ilin reen tra la aŭtuna pejzaĝo.

La tago finiĝis per festvespero en la salonego de la kongresejo. Post enkondu-

kaj salutoj de la LKK-prezidanto Alois Hauptenthal GEFA-prezidanto Giesner bonvenigis la ĉeestantojn, inter ili honor-gastoj de la fervojo, socialorganizaĵo, sindikato kaj Esperanto-organizaĵoj. Li esprimis sian dankon al ĉiuj, kiuj ebligis kaj finance subtenis tiun bone organizitan jarkunvenon. La honorgastoj siaflanke salutis la kunvenintojn agnoskante la altvaloran agadon de la esperantistaj fervojistoj. Por la landaj asocioj de IFEF transdonis bondezirajn s-ro de Sutter (Belgio), s-ino Fiechter (Svislando) kaj s-ro Robiolle (Francio). El liaj manoj Margarete Ullmann (Friedberg) akceptis la premion pri la amasa balon-ellaso aranĝita dum la ĉi-jara IFEF-kongreso en Perpignan, ĉar ŝia baloneto flugis la plej longan distancon. Krome salutis kiel ĉarma gasto s-ino Cvetkova el Leningrado. Bonajn rilatojn inter esperantistaj kaj aliaj kulturaj grupoj demonstris akordiona orkestro de junaj gefervojistoj, kiuj verve ludis konatajn gajajn melodiojn, sed ankaŭ fervojista blovorkestro, kiu poste stimulis al dancado per agrabla dancmuziko.

La dimanĉan matineon malfermis la GEFA-prezidanto memorigante unue pri la mortintoj de 1987. Li bedaŭris, ke la situacio rilate al la Esperanto-movado, speciale al la fervojista movado kaj ĝenerale al la mondo neniel plifavoriĝis intertempe. Multo el la lastjare dirita validas ankoraŭ nun. (Vidu ankaŭ n-ron 5/87 de BULTENO). D-ro Zamenhof siatempe batalis kontraŭ pli da malhelpaĵoj ol la nuntempuloj. Neniam li malesperis aŭ rezignis, ĉar li estis konvinkinta, ke necesis doni al la homoj tiun lingvon, por kiu li persiste agadis dum sia tuta vivo. Espero, obstino, pacienco estu la destinaj vortoj por la nuntempa generacio de esperantistoj, kiuj devas disvastigi kaj pluevoluigi la Internacian Lingvon. Neniam oni forgesu tiun respondecon.

En monologo, kiu baziĝis sur la rakonto „La lastaj infanoj de Oldrovalo“, la pola aktorino Gibczynska ludis kun emociiga scipovo la fikcian tragedion post neatendita faligo de atombombo sur germanan teritorion. Ŝi finis per kortuŝa apelacio al persona kunlaboro por konservi la pacon, la naturon kaj la vivon de ĉiuj homoj. Post silenta reago sekvis sincera aplaŭdo.

Du videofilmoj prezentis la lastan alparolon de la iama UEA-prezidanto Lapenna. Aŭdiĝis la voĉo de la vaste konata, intertempe mortinta oratoro okaze de inaŭgurita Esperanto-monumento en Graz (Aŭstrio). Scenoj pri la inaŭguro de la UEA-kongreso 1987 en Varsovio kun alparolo de la prezidanto Tonkin (Usono) finis la matinean programon.

Ankoraŭfoje la kongresanoj kolektiĝis en la restoracio, antaŭ ol ili revojaĝis al siaj hejmlukoj. La anoj de GEFA, ankaŭ tiuj,

kiuj mankis en tiu kunveno, kaj ĉiuj geamikoj de GEFA jam nun estas kore invitataj veni venontjare. Kien? Al Verden (Aller); ĝi situas ĉe la fervojlinio Bremen-Hannover. Kiam? De la 6a ĝis la 8a de oktobro 1989.

Fine estu kore dankataj s-ro Hauptenthal, komisiito por Esperanto ĉe la fervoja direkcio Saarbrücken, kaj liaj helpantoj pro la modela organizado de la 32a jarkunveno de GEFA en Kaiserslautern.

W. B.

Matineo Kaiserslautern 9.10.88

Kiam mi faris al mi pensojn pri tiu ĉi paroladeto, mi relegis tion, kion mi diris lastjare en la matineo. Multon kion mi tiam diris, mi simple ŝatus ripeti. Tamen mi ne tiel agos, sed provos iom kompletigi la pasintjarajn vortojn kaj lasas al vi, relegi Bultenon n-ro 5/57. Sed antaŭe mi menciuj, ke denove forlasis nin kelkaj membroj por ĉiam.

La situacio rilate al la Esperanto-movado, rilate al nia fervojista movado speciale kaj rilate al la mondo ĝenerale neniel plifavoriĝis intertempe. Ni ja povas konstati tre singardajn provetojn, iomete degeligi la krustiĝintajn rilatojn inter la grandpotencoj. La tuta homaro esperas bonajn rezultojn. Sed ja ne nur tio estos solvenda. Mi mencias nur la jarcentojn daŭrontajn konsekvencojn el Ĉernobilo, kia katastrofo neniam ripetiĝu, la venenigon de niaj riveroj kaj trinkakvo, la seninterrompan radioaktivan radiadon de la tiel pacaĵ atomreaktoroj. La sumo de tiuj minacoj kaj ĝia komplekseco ankoraŭ dum longega tempo postulos klopodojn tranĉi tiun Gordian nodon, kiu etendiĝas de la plej alta atmosfero ĉirkaŭ la tero ĝis la plej profundaj tavoloj en la oceanoj, kaj kio koncernas nian tutan planedon. La tuta homaro estas koncernita, hodiaŭ, morgaŭ, postmorgaŭ. Sed granda parto de la homaro tion ankoraŭ ne komprenas.

Kun tiu perspektivo ni eniras en la duan jarcenton de nia lingvo. Tio neniel plifaciligas nian taskon, disvastigi la lingvon, al kiu ni dediĉas parton de nia vivo. (Citaĵo el „Esperanto“ 9/88 p. 152 vortoj de d-ro Tonkin). Ni vidu klare, antaŭ ni la situacion, ke ne fariĝos pli facile alproksimiĝi al nia celo, male. Tamen: ne la unuan fojon mi atentigas pri d-ro Zamenhof, kiu tute certe devis batali kontraŭ pli da malhelpaĵoj ol ni nuntempuloj. Kaj li neniam malesperis, neniam rezignis, ĉar li estis konvinkita, ke necesis doni al la homoj tiun lingvon. Kaj li ne nur donis ĝin, sed persiste dum sia tuta vivo agadis por ĝi. Li trovis homojn, kiuj helpis al li, kiuj sentis, ke oni senhezite devas iri tiun vojon ekde la momento, kiam oni ekkonis, ke apenaŭ ekzistas io pli bona, pli nobla por fari ol kontribui helpe de tiu lingvo al pli paca kunvivado de la homoj. Estas nia afero tion imiti. La gvidvortoj el la kongreso de Katowice „espero, obstino, pacienco“, iam donitaj de Zamenhof mem, kondukis nin sur tiu dornoplana vojo. Same kiel la nuntempaj homoj respondecas por la bonfarto de la venontaj generacioj, same ni nunaj esperantistoj respondecas por la estonta vivo kaj ekzistado de la Internacia Lingvo. Neniam ni forgesu tiun respondecon.

Giessner

Malajzio:

La nord-suda magistralo estas modernigota.

La nord-suda magistralo de la Malajziaj Ŝtatfervojoj (Keretapi Tanah Melayu KTM), estas modernigota kaj ŝanĝkonstruota por pli altaj rapidecoj. Planata estas i.a.

nova dutraka normalspura linio, sur kiu la trajnoj inter Butterworth kaj Singapuro veturu per rapideco de 160 km/h. Kiel plia ebleco estas planata dutrakigo de la estanta etŝpura linio, ĉe kio ankaŭ mallarĝaj kurboj estu rektigitaj.

El Blickpunkt tradukis
Fritz Busse

Jarraporto

pri la periodo inter la 31a kaj 32a jarkunvenoj (1987/1988)

Enkonduko Komenciĝis la dua jarcento de la internacia lingvo Esperanto. La sekvanta jarraporto montru, kie ni, la fervojistoj germanaj, staras en tiu momento kaj kiuj estos niaj taskoj. Ni uzas la kutiman skemon por la raporto, tiel ke pli facile eblos kompari kun pli fruaj raporto.

Ĉi-jare ni devas funebri pri jenaj fidelaj membroj, kiuj forlasis nin por ĉiam. Ni deziras al ili eternan pacon.

Helmut Seidel (72) 13. 8. 87
Kurt Müller (78) 25. 1. 88
Georg Landgraf (68) 10. 4. 88
Ludwig Heintz (89) 11. 7. 88
Hans Barnickel (67) 18. 8. 88
Eduard Weichmann (69) 25. 8. 88

Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

Malgraŭ agnoskindaj klopodoj de aktivaj membroj ni ne sukcesis komplete egaligi la perdojn per novaj membroj. Sekve la nombro de individuaj membroj malkreskis de 445 al 441. Pro la personara politiko de la fervojo de jaro al jaro fariĝas pli malfacile trovi fervojistojn pretajn investi iom da spirita kapitalo en lernadon de lingvo, kiu ja nur povos utili post tiu lernado. Al IFEF ni pagis por entute 661 membroj (inkl. korporativajn), sekve havis 4 IFEF-komitatanon.

1.2 Kursoj

Neniu memstara kurso estas anocita. Sed partoprenis en la distriktoj Essen, Frankfurt, Hannover 31 personoj en 6 kursoj. Pri la rezulto mankas indikoj. La telekurso daŭre funkcias, kvankam nur parto el la mendintoj, tralaboras la tutan materialon (komp. komenton pasint-jaran). Ĝis nun estas venditaj 206 tiaj kursoj.

1.3 Funkcuroj

Neniuj ŝanĝoj. La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) = Giessner, Grass, Riehn kunvenis kun la komisiitoj en Ingolstadt (oktobro) kaj Fulda (marto).

2. Kunlaboro kun IFEF

La 40a jubilea IFEF-kongreso okazis komence de junio en Perpignan (F). La favore situanta kongresloko allogis 61 germanajn partoprenantojn. Niaj komitatanoj estis kol. Böhnke, Grass, Herlitze kaj Ritterspach. Reelektiitaj por la IFEF-estraro kiel prezidanto resp. sekretario estis kol. Giessner kaj Rösemann. Ambaŭ partoprenis en estrarkunvenoj printempe en Bergen (N) kaj aŭtune en Ry (DK). Kiel en la pasintaj jaroj nia komitatano Ritterspach organizis ankaŭ en Perpignan la kongresan programeron „Fervojoj Aktualajoj el diversaj landoj“.

Nepre la plej grava momento en tiu 40a kongreso estis - apud aliĝo de du novaj landaj asocioj - la pretigo de la Fervoja Terminaro. Gernot Ritterspach kiel gvidanto de la Terminara Komisiono prezentis tiun rezulton de multjara komuna laboro. La redaktoro de la Terminara Kuriero, H.D. Hartig, kiu dum dudeko da jaroj zorgis por akurata laboro en TK kaj forte stimulis ties kunlaborantojn, meritite ricevis oran medalon de FISAIC el la mano de ties ĝenerala prezidanto Schmit. Ni menciuj, ke kol. G. Ritterspach jam en 1971 ricevis medalon de FISAIC pro siaj meritoj en terminara laboro. En la 17 jaroj pasintaj de tiam li ne laciĝis, ĝis li nun povis prezenti la rezulton. Tio signifas, ke esperantistoj en la tuta mondo fine povos uzi samajn fervojfakajn terminojn. Kol. Willi Barnickel tradukis Aldonon A al la Konvencio COTIF sub titolo „Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV)“. La novan statuton de FISAIC tradukis Giessner. IFEF eldonos la Esperanto-version por landaj asocioj, kies naciaj lingvoj ne estas franca aŭ germana.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 31a jarkunveno de GEFA okazis de la 9a ĝis 11a de oktobro 1987 en Ingolstadt. Partoprenis 93 gekologoj kaj familianoj, inter ili gastoj el 6 landoj. Multaj membroj ĉeestis aranĝojn en aliaj landoj, ekz. la UK Rotterdam, fervojistajn ren-

kontiĝojn en NL/B, CS, DDR, DK, F, H, kaj GB. La ĉi-jara IFEF-skisemajno okazis de 27. 2. ĝis 5. 3. 88 en Spitzingsee (Bavario) kun 41 partoprenantoj el 8 landoj. Dank' al helpo de BSW-ĉefestraro povis okazi speciala seminario por kursgvidantoj 14. ĝis 18. 11. 87 en Rantum. Instruis s-ino A. Childs-Mee el Nederlando. Partoprenis 14 personoj, kiuj fine ricevis atestilon.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

„Bulteno“ aperis kvinfoje, denove 4 numeroj el ili pagitaj de BSW, unu kiel eldonaĵo de GEFA. Aperis antute 40 paĝoj kun 10 fotoj.

4.2 Gazetaro

En tagaj gazetoj, fakaj informiloj kaj sindikataj revuoj ni povis konstati la kontentigan nombron de 113 artikoloj pri nia agado. Gojiga estas la aperigo de ofte longaj kaj efikaj artikoloj en la distriktaj „BSW-Mitteilungen“ flanke de la distriktaj komisiitoj.

4.3 Informado, varbado

Ni distribuis ĉirkaŭ 2500 informilojn kaj elpendigis ĉ. 100 afiŝojn. Niaj membroj organizis aŭ kunorganizis 9 ekspoziciojn vizititajn de ĉ. 5000 personoj en Bremen, Duisburg, Ingolstadt, Offenburg, Regensburg, Schwelm kaj Stuttgart. En la jarlibro de UEA denove troviĝas tutpaĝa anonco de DB, kiu informas pri multaj prezfavoroj, same kiel „Inter-Rail“ daŭre mencias la Pasportan Servon de TEJO. Ekde tiu jaro ni provizas la hejmojn de BSW per informiloj. La distrikto Hamburg eldonis efike varban informilon. La komisiono por varbado/informado eklaboris. En radio laŭ nia scio estis 11 sendaĵoj pri nia agado.

4.4 Aliaĵoj

Ni eksciis pri 7 fakprelegetoj diverslokaj. En „Monato“ aperis 7 fakaj artikoloj de Ritterspach (4) kaj Giessner (3), krome en la verko „Antaŭ la nova jarmilo“ (eldonita de GEA) artikolo de Giessner „Fervojoj ankaŭ estontece“. Por la suplemento de PIV Ritterspach kontribuis 36 fervojajn terminojn.

5. Emerituloj

La ĉi-jara renkontiĝo de la emerituloj

okazis en Bonn-Beuel (hotelo Wilkens) kiel ĉiam sub gvidado de Elfriede Kruse. Partoprenis 35 personoj. Dankon al s-ino Kruse pro la bona organizado kaj al BSW pro ĉiujara helpo. Nome de la partoprenantoj kol. Brandenburg skribe dankis al BSW-ĉefestraro.

6. Perspektivo

Ni komencu per la finvortoj de la pasintjara raporto: „Ni konsciiĝu, ke ni havas la taskon, zorgi, ke nia lingvo sendifekte, bone funkciante kaj plidivastigite estos donata al venontaj generacioj en la senco de d-ro Zamenhof“. Sed estas rimarkeble, ke ni, la fervojistaj esperantistoj, eklitas en situacion, kiu povos fariĝi danĝera por nia ekzistado. Tiu konstato koncernas ne nur nin, la germanan asocion de IFEF, sed tiu ĉi raporto koncernas ĉiujn. Malgraŭ ĉiuj kontraiaj klopodoj la membronombro ne nur simple malkreskas de jaro al jaro, sed la konsisto de la membraro laŭ aĝo de la membroj pli kaj pli malfavoriĝas. Tie ĉi ne estas spaco por esplori kaŭzojn, kiuj cetere estas konataj kaj jam ofte diskutitaj. Sed tio estas la loko por denove kaj klare montri tiun danĝeron. Ne eblas vivteni organizon, kiam daŭre nur malmultaj aktivuloj stracegas siajn fortojn, dum la aliaj restas indiferentaj, kvaŝaŭ la Internacia Lingvo ne koncernas ilin. La hontinde malalta nombro de aliĝoj al tiu jarkunveno pravas tion. Restos nenio alia ol mobilizi ĉiujn aktivecojn, klarigi al ĉiuj membroj - kaj tio estas **individua tasko de ĉiu unuopulo** - ke spite al la nefavoraj ĝeneralaj kondiĉoj necesas inversigi tiun tendencan kaj altiri novajn adeptojn, precipe junajn. Ĉiu, kiu legas tion, decidu helpi en tiu momente plej grava tasko. De ĝia plenumo aŭ neplenumo dependos la vivo de GEFA.

kompilis: Giessner

Kristnasko alproksimiĝas

Gojigu viajn amikojn

en Germanio kaj ĉie en la mondo per la libroj „La lastaj infanoj de Oldrovalo“ de Gudrun Pausewang, 77 paĝoj, tradukita de Joachim Giessner, 13,90 DM, kaj „La Fratoj Leonkoro“ de Astrid Lindgren, 128 p., ilustrita, 19,80 DM. Ekde 3 ekz. rabato. Mendu ĉe Joachim Giessner, An der Nicolaischule 3, 3420 Herzberg am Harz, pagu post ricevo.

GEFA - Jahrestagung in Kaiserslautern

Zum 32. Mal nach der Neugründung der Vereinigung deutscher Eisenbahner- Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) trafen sich die Sprachfreunde zu ihrem traditionellen Herbsttreffen. Im Kolpinghaus von Kaiserslautern verlebten sie vom 7. bis 9. Oktober 1988 ein Wochenende mit ausgefülltem Programm. Gäste aus Belgien, Frankreich, Polen, der Schweiz und erstmalig aus der Sowjetunion verliehen der Veranstaltung internationales Flair.

Den Auftakt bildete am Freitagvormittag eine Pressekonferenz, die zu einem über Esperanto positiven Artikel in der Zeitung „Die Rheinpfalz“ führte. Im Casimir-Saal der ehemaligen Hohenstaufenpfalz begrüßte am Nachmittag Oberbürgermeister Vondano, ein ehemaliger Bundesbahnkollege und Anhänger des Esperanto, die Tagungsgäste. In launigen Worten schilderte er die mit manchen Zerstörungen und Besetzungen verbundene Geschichte seiner Heimatstadt und ging auf seinen vielfältigen Aufgabenbereich ein. Daneben zeigte er sich sehr beeindruckt von der Tätigkeit der Eisenbahner-Esperantisten, die sich über die Landesgrenzen hinaus für die sprachliche Verständigung und damit den Frieden einsetzen. GEFA-Vorsitzender Gießner dankte bewegt für den überaus freundlichen Empfang. Am Abend traf man sich im Kolpinghaus zum gemütlichen Beisammensein, wo alte Bekannte begrüßt und Freundschaften erneuert wurden, kein Wunder bei dem süffigen Wein aus Rheinland-Pfalz.

Der Samstagvormittag sah ein zweigeteiltes Programm vor. Die meisten Teilnehmer folgten dem Angebot zu einer Stadtbesichtigung; sie nahen ihren Ausgang am modernen Rathaus, das sich rühmt, das höchste in unserem Land zu sein. Erstaunlich war, wieviele sehenswerte Bauten dieser grenznahen und daher oft Zerstörungen ausgesetzten Stadt durch die Jahrhunderte gerettet werden konnten, etwa die mittelalterlichen Kirchen oder die im florentinischen Baustil errichtete Fruchthalle. Leider wurde die Besichtigung durch die ungünstige Witterung beeinträchtigt.

Zur selben Zeit beriet der Vorstand der Vereinigung mit den Bezirksbeauftragten für Esperanto über die anstehenden Themen der Tagesordnung, deren Ergeb-

nisse hier nur angedeutet werden können. So wurde über künftige Veranstaltungen auf nationaler und internationaler Ebene diskutiert. Eine besondere Arbeitsgruppe stellte das Ergebnis des Fernkurses für Esperanto-Anfänger vor. Für Fortgeschrittene soll ebenfalls ein Fernkursus unter Leitung von Herrn Lautenbach vorbereitet werden. Besondere Aufmerksamkeit galt den abgeschlossenen Übersetzungsarbeiten am Eisenbahnwörterbuch des Internationalen Eisenbahnverbandes (UIC). Das nächste Ziel wird die Erarbeitung zweisprachiger Wörterbücher sein. Der Motor dieser internationalen Arbeitsgruppe sind die Kollegen Ritterspach und Hartig.

GEFA-Vorsitzender Gießner dankte allen an der Diskussion Beteiligten für ihre eifrige Mitarbeit, insbesondere Frau Laudemann, die namens des Hauptvorstandes des Bundesbahn- Sozialwerks mit großem Interesse an der Veranstaltung teilnahm. Frau Laudemann gab bei dieser Gelegenheit einen gedrängten Überblick über die vielfältigen Aufgaben des BSW und sicherte auch für die Zukunft die moralische und finanzielle Unterstützung des BSW zu.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen stand ein Bus für eine Fahrt in die reizvolle Umgebung bereit. Ziel war das römische Freilichtmuseum Schwarzenacker in der Nähe von Homburg (Saar). Dort waren die Reste einer römischen Landstadt zu besichtigen; sie wurden erst 1965 unter einem Ackergelände entdeckt. Die Ruinen mitsamt einigen rekonstruierten Gebäuden boten den Besuchern eine Vorstellung, wie sich das Leben in einer unbefestigten Siedlung abgespielt hat. In der Nähe von Trippstadt lud eine ehemalige stattliche Mühle zu Kaffee und Kuchen ein, ehe die Rückfahrt durch die herbstliche Landschaft angetreten wurde.

Der Tag endete mit einem Festabend im Tagungsgebäude. Zur Einstimmung spielte das Jugend- Harmonikaorchester des BSW unter der Leitung von Herrn Bolin bekannte frohe Weisen. Herr Hauptenthal, der Beauftragte für Esperanto beim Bezirk Saarbrücken, begrüßte die Anwesenden. GEFA-Vorsitzender Gießner stellte die Ehrengäste vor und dankte allen Kollegen, die das Gelingen der Tagung ermöglicht und unterstützt hatten, insbesondere Herrn Horlemann vom BSW-Bezirksvorstand Saarbrücken. Besondere Grüße überbrachten folgende Ehrengäste:

Herr Gilcher für das BSW und die BD Saarbrücken,
Herr Suffel für den Bahnhof
Kaiserslautern Hbf,

Herr Schäfer für die Christliche
Gewerkschaft deutscher Eisenbahner,

Herr Dörr für den Saarländischen
Esperanto-Bund,

Herr de Sutter für die belgischen
Eisenbahner-Esperantisten,

Herr Robiolle für die französischen
Eisenbahner-Esperantisten,

Frau Fiechter für die schweizerischen
Eisenbahner-Esperantisten,

Frau Svetkova als Gast aus der
Sowjetunion.

Alle Grußworte enthielten ermutigende und anerkennende Sätze für die Tätigkeit der deutschen Eisenbahner-Esperantisten. Der Abend klang mit beschwingten Tanzweisen aus. Selten hat bei einem Jahrestreffen ein so großes Blasorchester wie das des BSW aus Lauterecken unter der Stabführung von Herrn Christoffel gespielt.

Die sonntägliche Matinee wurde vom GEFA-Vorsitzenden eröffnet. Nach einem Gedenken an die verstorbenen Mitglieder wies Herr Gießner auf die zunehmende Überalterung der Vereinigung hin und rief die Tagungsteilnehmer auf, ihre Bemühungen zur Gewinnung junger Kollegen zu verstärken. Der eigentliche Jahresbericht ist an anderer Stelle dieser Ausgabe wiedergegeben.

Für das nachfolgende Programm war die Schauspielerin Gibczynska aus Krakau (Polen) gewonnen worden. In einem

Einpersonenstück, das auf der Erzählung „Die letzten Kinder von Schewenborn“ beruht, wurden die Folgen eines Atombombenabwurfs geschildert. Die renommierte Schauspielerin trug in erschütternden Szenen das fiktive, tragische Geschehen am Schicksal einiger Kinder vor, an dessen Ende ein Aufruf zum persönlichen Einsatz für den Frieden stand. Die Zuhörer waren sehr beeindruckt. Zum Abschluß wurden Videofilme über die letzte Ansprache des vormaligen, inzwischen verstorbenen UEA-Präsidenten Lapenna, ferner Ausschnitte aus der Eröffnung des UEA-Kongresses 1987 in Warschau gezeigt.

Noch einmal fand man sich zum gemeinsamen Essen zusammen, ehe die Heimreise angetreten wurde. Schon jetzt lädt die Vereinigung zum nächsten Jahrestreffen ein, das vom 6. bis 8. Oktober 1989 in Verden an der Aller stattfindet und vom Bezirk Hannover ausgerichtet wird. Herrn Hauptenthal und seinen rührigen Helfern ist für die Ausrichtung der Tagung herzlich zu danken.

W. B.

Bitte des Schriftleiters:

Senden Sie möglichst druckreife Beiträge zur Veröffentlichung mit 1/2 fachem Zeilenabstand und 1 Durchschrift oder Ablichtung.

Überprüfen Sie bitte das Anschriftenverzeichnis in Nr. 1/88, Seite 8. Veränderungen bitte umgehend dem Schriftleiter mitteilen, da die redigierte Neufassung im Bulteno 1'89 erscheinen soll.

=====

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geomikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplanan Novan Jaron.

=====

Esperanto-Linio

La Karlskoga Popolaltlernejo aranĝos 1989 semajnajn kursojn por komencantoj kaj progresantoj kaj 1 kurson „3 niveloj“.

Informojn kaj aliĝilojn petu ĉe:
Karlskoga Popolaltlernejo, Box 192,
S-69124 Karlskoga/Svedio,
Telefono 0586-503 60.

Seniorentreffen in Bonn

35 Senioren folgten am 3. September 1988 der Einladung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten zu einem ein-tägigen Treff in Bonn.

Im Hotel Wilkens in Bonn-Beuel, nahe am Bahnhof, begrüßte Elfriede Kruse im Namen des BSW die Gäste aus nah und fern mit einer Lesung aus dem Buch „Eine Handvoll Freundlichkeiten“. Die Senioren berichteten aus ihrem langen Leben und über ihre Erfahrungen. Als Gast nahm Josette Forslund aus Südfrankreich teil. Nach einem ausgezeichneten Mittagessen übernahm der Bba Köln Erhard Herlitze eine Führung durch Bonn zu den interessanten Sehenswürdigkeiten der Bundeshauptstadt, die im nächsten Jahr ihr 2000. Jubiläum feiert. Nach dem Rundgang brachte eine Fähre die Teilnehmer wieder auf die andere Rheinseite.

Anschließend genossen die Senioren einen gemütlichen Kaffeepausch, ehe sie die Heimfahrt antraten, um sich hoffentlich 1989 gesund wiedersehen zu können. Leider sind innerhalb eines Jahres 9 Teilnehmer der vergangenen Treffs verstorben, derer in unserem Bulteno gedacht wurde.

Herzlichen Dank dem BSW-HV der diese Tagung ermöglichte, an Elfriede Kruse und Erhard Herlitze die diese Veranstaltung ausgerichtet und durchgeführt haben.

Aus den Gruppen

Bremen

Am 14. 9. stand die Veranstaltung unter dem Titel „Lebende Zeitung“. Ausgesuchte Artikel wurden behandelt, beleuchtet und ausdiskutiert.

Am 12. 10. fand ein vergnügter Abend mit allerlei Kurzweil und gemeinsamem Singen - alles in Esperanto - statt.

IFEF-skisemajno

28. 1. - 4. 2. 1969 en Mühlbach, Aŭstrio.
Informoj ĉe Astrid Birkbak, Rugvaenget 46,
DK-2750 Ballerup, Danio.

Nekrologo

La 25an de aŭgusto forlasis nin
Eduard Weichmann (69)
el Dortmund.

Li estis membro de GEFA ek de multaj jaroj kaj fervora Esperantisto jam de antaŭ la milito, organizinto de SAT-kongreso 1958 en Dortmund, fondinto de la „Arbeiter-Esperanto-Ausstellung“ en „Max-Hüser-Institut“, Dortmund, komisiito de „Dortmunda Esperanto-Grupo“ en la „Rheinisch-Westfälischen-Auslandsgesellschaft, membro de SAT, sekretario de „Libera Esperanto-Asocio“ (LEA) kaj redaktoro de LEA-Infomilo.

Esperanto perdis simpatian kaj sindonan samideanon!

Esperanto-Fernkurs n e u

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen.

Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lehrbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lerntempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.

Kurskosten: 30,- DM

Bestellung: Einzahlung auf das
Postgirokonto 61 150-466
beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schrappe,
Schmittingheide 17 d,
4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift:

BSchule 440 Münster (Westf.).

Redaktfino por n-ro 1/89 estas la 15. 1. 1989